

## **Konsiloj kaj Demandoj**

de la Jarkunveno de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj) en Britujo (1994).

*Reviziita laŭ notataĵoj de Douglas Draper faritaj en KES-kunsido en Poznan 2007 kaj ree funde reviziita de David Kelso kaj Douglas Draper maje 2010.*

*Pri la traduko de worship por la kvakeraj silentaj kunvenoj estas diversaj opinioj. Iuj volas pluuzi ador-, ĉar ĝi estas enradikiĝinta, aliaj trovas ĝin tute maltaŭga, proponante anstataŭe silentum-. Ŝajnas neeble fari definitivajn elekton nun, tial ni preparis du alternativajn versiojn de §§8-14, kaj lasas la finan decidon al la uzado.*

1. Atentu, karaj Amikoj, la impulsojn de amo kaj vero en viaj koroj. Fidu ilin kiel gvidojn de Dio, kies Lumo montras al ni nian mallumon kaj nove revivigas nin.
2. Ordigu vian tutan vivon laŭ la spirito de Kristo. Ĉu vi estas malferma al la resaniga potenco de la dia amo? Ame prizorgu tion de Dio en vi, tiel ke tiu amo kresku en vi kaj gvidu vin. Via adorado / silentumado kaj via ĉiutaga vivo pliriĉigu unu la alian. Ŝategu vian sperton de Dio, kiel ajn ĝi venas al vi. Memoru, ke kristanismo estas ne nocio, sed vojo.
3. Ĉu vi provas rezervi tempojn de kvieto por esti malferma al la Sankta Spirito? Ni ĉiuj devas trovi vojon en silenton kiu ebligas al ni pliprofundigi nian konscion de tio de Dio kaj trovi la internan fonton de nia forto. Celu trovi internan kvieton, eĉ inter la agadoj de la ĉiutaga vivo. Ĉu vi kulturas en vi mem kaj en aliaj kutimon de dependo de la gvidado de Dio por ĉiu tago? Tenu vin kaj aliajn en la Lumo, sciante ke ĉiuj estas ame prizorgataj de Dio.
4. La Religia Societo de Amikoj radikas en kristanismo kaj de ĉiam trovas inspiron en la vivo kaj instruoj de Jesuo. Kiel vi interpretas vian fidon rilate al ĉi tiu heredaĵo? Kiel Jesuo parolas al vi hodiaŭ? Ĉu vi sekvas la ekzemplon de Jesuo pri amo en agado? Ĉu vi lernas de lia vivo la realon kaj koston de obeado al Dio? Kiel lia rilato al Dio defias kaj inspiras vin?
5. Dediĉu tempon por ekscii pri la spertoj de aliaj pri la Lumo. Memoru la gravecon de la Biblio, la verkoj de Amikoj kaj ĉiuj verkoj kiuj malkaŝas la vojojn de Dio. Lerninte de aliaj, ĉu vi povas viavice doni malavare el tio, kion vi gajnis? Respektante la spertojn kaj opiniojn de aliaj, ne hezitu diri kion vi trovis kaj kio valoras al vi. Konstatu ke dubo kaj demandado povas ankaŭ konduki al spirita evoluo kaj al pli granda konscio de la Lumo kiu estas en ni ĉiuj.
6. Ĉu vi volonte laboras kun aliaj religiaj grupoj strebante al komunaj celoj? Restante fidela al kvakeraj komprenoj, provu eniri imageme en la vivon kaj atestadon de aliaj komunumoj de fido, kune kreante ligojn de amikeco.
7. Konsciu la spiriton de Dio efikantan en la ordinaraj agadoj kaj spertado de via ĉiutaga vivo. Spirita lernado daŭras dum la tuta vivo, kaj ofte en manieroj neatendataj. Troviĝas inspiro ĉie ĉirkaŭ ni, en la natura mondo, en la sciencoj kaj artoj, en nia laboro kaj niaj amikaj rilatoj, en niaj afliktoj kiel ankaŭ en niaj ĝojoj. Ĉu vi estas malferma al nova lumo, de kiu ajn fonto ĝi venas? Ĉu vi aliras novajn ideojn distingeme?

### **§§ 8-14, versio A kun 'silentum-'**

8. Kunsilentumo estas nia reago al nia konscio de Dio. Ni povas silentumi solaj, sed kiam ni kuniĝas kun aliaj en esperplena atendado, eblas ke ni pli profunde sentas dian ĉeeston. Ni celas kuniĝintan kvieton en nia silentumo, kaj ke per tio ni ĉiuj sentu la potencon de la dia amo, nin kuntiranta kaj gvidanta.

9. Per silentumo ni plej respektive eniras en interrilaton kun Dio kaj respondas al la vokoj de la Sankta Spirito. Alvenu en la silentumadon kun koro kaj menso preparitaj. Cedu vin kaj ĉiujn viajn eksterajn zorgojn al la dia gvidado, tiel ke vi konstatu “la malbonon malfortiĝanta en vi kaj la bonon fortigata”.
10. Venu regule al kunsilentumado, eĉ kiam vi estas kolera, deprimita, laca aŭ spirite malvarma. Petu kaj akceptu preĝecan subtenon de aliaj, kuniĝintaj kun vi en silentumado. Penu trovi spiritan integrecon, kiu ampleksas suferadon krom dankemo kaj ĝojo. Preĝo, el profunda loko en la koro, povas doni kuracon kaj unuecon kiel nenio alia. Silentumado nutru vian tutan vivon.
11. Estu honesta al vi mem. Kiujn malagrablajn verojn vi eble evitas? Kiam vi agnoskas viajn personajn mankojn, ne lasu tion malkuraĝigi vin. En kunsilentumo ni povas trovi certigon de la dia amo kaj forton por daŭrigi kun nova kuraĝo.
12. Kiam vi estas malatenta kaj distrata en silentuma kunsido, lasu malordajn kaj ĝenajn pensojn cedi trankvile al via konscio de la dia ĉeesto inter ni kaj en la mondo. Akceptu la voĉan pastradon de aliaj laŭ sinteno tenera kaj kreema. Serĉu la signifon funde de ĝi, agnoskante ke kvankam ĝi eble ne estas por vi vortoj de Dio, ĝi tamen povas esti tia por aliaj. Memoru ke ni ĉiuj kune respondecas pri la kunsilentumado, ĉu nia pastrado estas de silento, ĉu per parolo.
13. Ne supozu ke parola pastrado neniam estos via rolo. Fidelo kaj sincero en parolado, eĉ tre mallonga, povas malfermi vojon al pli ampleksa pastrado de aliaj. Voligite paroli, atendu pacience por ekscii ke la gvido kaj la tempo estas ĝustaj, sed ne lasu senton de via propra neindeco deteni vin. Preĝu ke via pastrado fontu el profunda sperto, kaj fidu ke vortoj estos donataj al vi. Volu paroli bone aŭdeble kaj klare, kaj kun sentemo por la bezonoj de la aliaj. Gardu vin ne paroli antaŭdireble aŭ tro ofte, aŭ fari aldonojn proksime al la fino de la silentumado, kiam estis jam bone sen tio.
14. Ĉu viaj aferkunsidoj okazas en spirito de silentumo kaj en dependo de dia gvidado? Memoru ke ni ne celas decidon de la plimulto, eĉ ne unuaniman akordon. Se ni pacience atendas dian gvidadon, la ĝusta vojo laŭ nia sperto malfermiĝos kaj ni gvidiĝos en unuecon.

-----  
**§§ 8-14, versio B kun 'ador'.**

8. Adoro estas nia reago al nia konscio de Dio. Ni povas adori solaj, sed kiam ni kuniĝas kun aliaj en esperplena atendado, eblas ke ni pli profunde sentas dian ĉeeston. Ni celas kuniĝintan kvieton en nia adoro, kaj ke per tio ni ĉiuj sentu la potencon de la dia amo, nin kuntiranta kaj gvidanta.
9. En adorado ni plej respektive eniras en interrilaton kun Dio kaj respondas al la vokoj de la Sankta Spirito. Alvenu en la adorkunvenon kun koro kaj menso preparitaj. Cedu vin kaj ĉiujn viajn eksterajn zorgojn al la dia gvidado, tiel ke vi konstatu “la malbonon malfortiĝanta en vi kaj la bonon fortigata”.
10. Venu regule al adorkunvenoj, eĉ kiam vi estas kolera, deprimita, laca aŭ spirite malvarma. Petu kaj akceptu preĝecan subtenon de aliaj, kuniĝintaj kun vi en adorado. Penu trovi spiritan integrecon, kiu ampleksas suferadon krom dankemo kaj ĝojo. Preĝo, el profunda loko en la koro, povas doni kuracon kaj unuecon kiel nenio alia. Adorado nutru vian tutan vivon.
11. Estu honesta al vi mem. Kiujn malagrablajn verojn vi eble evitas? Kiam vi agnoskas viajn personajn mankojn, ne lasu tion malkuraĝigi vin. En kuna adoro ni povas trovi certigon de la dia amo kaj forton por daŭrigi kun nova kuraĝo.

12. Kiam vi estas malatenta kaj distrata en adorkunsido, lasu malordajn kaj ĝenajn pensojn cedi trankvile al via konscio de la dia ĉeesto inter ni kaj en la mondo. Akceptu la voĉan pastradon de aliaj laŭ sinteno tenera kaj kreema. Serĉu la signifon funde de ĝi, agnoskante ke kvankam ĝi eble ne estas por vi vortoj de Dio, ĝi tamen povas esti tia por aliaj. Memoru ke ni ĉiuj kunrespondecas pri la adorkunveno, ĉu nia pastrado estas de silento ĉu per parolo.
  13. Ne supozu ke parola pastrado neniam estos via rolo. Fidelo kaj sincero en parolado, eĉ tre mallonga, povas malfermi vojon al pli ampleksa pastrado de aliaj. Voligite paroli, atendu pacience por ekscii ke la gvido kaj la tempo estas ĝustaj, sed ne lasu senton de via propra neindeco deteni vin. Preĝu ke via pastrado fontu el profunda sperto, kaj fidu ke vortoj estos donataj al vi. Volu paroli bone aŭdeble kaj klare, kaj kun sentemo por la bezonoj de la aliaj. Gardu vin ne paroli antaŭdireble aŭ tro ofte, aŭ fari aldonojn proksime al la fino de la kunveno, kiam estis jam bone sen tio.
- 
14. Ĉu viaj aferkunsidoj okazas en spirito de adoro kaj en dependo de dia gvidado? Memoru ke ni ne celas decidon de la plimulto, eĉ ne unuaniman akordon. Se ni pacience atendas dian gvidadon, la ĝusta vojo laŭ nia sperto malfermiĝos kaj ni gvidiĝos en unuecon.
  15. Ĉu vi partoprenas laŭpove ofte en aferkunsidoj? Ĉu vi sufiĉe konas la gvidprincipojn de nia Societo por kontribui al ties disciplinaj procedoj? Ĉu vi traktas malfacilajn demandojn per informita menso kiel ankaŭ per grandanima kaj amema spirito? Ĉu vi pretas lasi viajn personajn preferojn kaj komprenojn viciĝi kun tiuj de aliaj aŭ esti formetitaj dum la kunsido serĉas la ĝustan vojon antaŭen? Se vi ne povas ĉeesti, subtenu la kunsidon perpreĝe.
  16. Ĉu vi bonvenigas la diversecon de kulturoj, lingvoj kaj fidesprimoj inter nialandaj kvakeroj kaj en la tutmonda komunumo de Amikoj? Penu pliigi vian komprenon kaj profiti de tiu riĉa heredaĵo kaj vasta gamo da spiritaj komprenoj. Subtenu vian propran kaj aliajn jarkunvenajn kvakerarojn en viaj preĝoj.
  17. Ĉu vi respektas tion de Dio en ĉiu, kvankam ĝi eble esprimiĝas en nekutimaj manieroj aŭ estas malfacile perceptebla? Ĉiu el ni havas apartan sperton de Dio, kaj ĉiu devas eltrovi kiel fideli al ĝi. Kiam vortoj estas strangaj al vi aŭ maltrankviligaj, penu percepti de kie ili devenas kaj kiel ili nutris la vivon de aliaj. Atentu pacience kaj serĉu la veron, kiun la opinioj de aliaj povas enhavi por vi. Evitu vundan kritikon kaj provokan lingvaĵon. Ne permesu la forton de viaj kredoj misgvidi vin, tiel ke vi deklaru aŭ asertu maljuste aŭ malvere. Konsideru, ke vi eble malpravas.
  18. Kiel ni povas fari la kunvengrupon komunumo en kiu ĉiu persono estas akceptata kaj nutrata, kaj nekonatoj estas bonvenaj? Penu koni unu la alian en la aferoj eternaj, portu la ŝarĝon de la neperfektaĵoj de aliaj, kaj preĝu unuj por la aliaj. Kiam ni eniras kun milda simpatio en la ĝojojn kaj malfeliĉojn de la vivoj de la aliaj, pretaj doni helpon kaj ĝin ricevi, nia kunvengrupo povas esti kanalo por la diaj amo kaj pardonemo.
  19. Ĝoju pro la ĉeesto de infanoj kaj gejunuloj en via kunvengrupo, kaj agnosku la talentojn, kiujn ili alportas. Memoru, ke la tuta grupo kunrespondecas pri ĉiu infano sub sia zorgo. Celu por ili, kiel por vi mem, plenan disvolviĝon de la diaj donacoj kaj la abundan vivon, kiu laŭ Jesuo povas iĝi nia. Kiel vi konigas al ili viajn plej profundajn kredojn, tamen lasante ilin liberaj disvolviĝi laŭ la gvido de la dia spirito? Ĉu vi invitas ilin paroli kun vi pri siaj envidoj? Ĉu vi estas preta kaj lerni de ili kaj akcepti viajn respondecojn pri ili?
  20. Ĉu vi donas sufiĉan tempon al interparoloj kun aliaj en la kunvengrupo, tiel novvenintoj kiel longtempaj membroj, pri via kompreno de silentumo /adorado, servado, kaj sindediĉo al la atestado de la Societo? Ĉu vi donas decan porcion de via mono por subteni kvakeran laboron?

21. Ĉu vi amzorgas pri viaj amikecoj, tiel ke ili kresku laŭ profundo, kompreno kaj reciproka respekto? En intimaj homrilatoj ni povas, krom trovi ĝojon, ankaŭ riski ĉagrenon. Kiam ni spertas grandan feliĉon aŭ grandan ĉagrenon, ni eble estas pli malfermaj al la influo de la Spirito.
22. Respektu la grandan diversecon inter ni en niaj vivoj kaj interrilatoj. Detenu vin de antaŭjuĝoj pri la vivovojaĝoj de aliaj. Ĉu vi flegas la spiriton de reciproka kompreno kaj pardonemo kiun nia disĉipleco postulas de ni? Memoru, ke ĉiu el ni estas infano de Dio, unika kaj altvalora.
23. Geedziĝon Amikoj de ĉiam rigardas kiel religian sindediĉon, ne nur kiel civilan kontrakton. Ambaŭ geedziĝantoj atestu kun helpo de Dio sian intencon amzorgi unu pri la alia la tutan vivon. Memoru, ke feliĉo dependas de kompreno kaj firma amo ambaŭflanke. En malfacilaj tempoj rememorigu vin pri la valoro de preĝado, de persisto kaj de humuremo.
24. Infanoj kaj gejunuloj bezonas amon kaj stabilecon. Ĉu ni faras ĉion eblan por subteni kaj fortigi gepatrojn kaj aliajn havantajn respondecon provizi tian prizorgon?
25. Longdaŭra homrilato alportas streĉojn krom kontentigo. Se la interrilato kun via kunul(in)o streĉiĝas, serĉu helpon kompreni la vidpunkton de la alia, kaj esplori viajn proprajn sentojn, kiuj eble estas potencaj kaj detruaj. Konsideru la dezirojn kaj sentojn de iuj koncernataj infanoj, kaj memoru ties daŭran bezonon de amo kaj sekuro. Serĉu la dian gvidon. Se vi spertas la doloron de apartiĝo aŭ eksedziĝo, provu daŭrigi iom da kompata interkomunikado, tiel ke aranĝoj fariĝu kun minimuma amaro.
26. Ĉu vi agnoskas la bezonojn kaj la talentojn de ĉiu familiano kaj domano, ne forgesante la proprajn? Penu ke via hejmo estu loko de plena amikeco kaj ĝuo, kie ĉiuj loĝantoj kaj vizitantoj trovu la pacon kaj refreŝiĝon de la dia ĉeesto.
27. Vivu aventureme. Kiam vi havas elekton, ĉu vi prenas tiun vojon kiu donas la plej bonan okazon utiligi viajn talentojn serve al Dio kaj la komunumo? Via vivo elparolu. Kiam necesas decidoj, ĉu vi pretas kuniĝi kun aliaj, serĉante klaron, petante dian gvidon kaj proponante konsilon unuj al la aliaj ?
28. Ĉiu etapo de niaj vivoj prezentas novajn eblojn. Responde al dia gvido, provu percepti la ĝustan tempon por akcepto aŭ rezigno de respondeco sen troa fiereco aŭ kulposento. Atentu kion amo postulas de vi, kio eble ne estas multa okupateco.
29. Alfrontu la maljunecon kuraĝe kaj espere. Laŭeble, faru aranĝojn pri via prizorgado ĝustatempe, tiel ke aliaj ne tro ŝarĝitos. Kvankam la maljunaĝo povas venigi pliiĝantajn nekapablon kaj solecon, ĝi povas venigi ankaŭ serenon, distanciĝon kaj saĝon. Preĝu ke en viaj finaj jaroj vi ekkapablu trovi kiel ricevi kaj speguli la dian amon laŭ novaj manieroj.
30. Ĉu vi kapablas pripensi vian morton kaj la morton de tiuj plej proksimaj al vi ? Akceptinte la fakton de morto, ni liberiĝas pli plene vivi. Kiam mortas tiaj plej proksimaj, lasu al vi tempon sufiĉan por funebri. Kiam funebras aliaj, via amo ĉirkaŭprenu ilin.
31. Ni estas vokataj vivi "en la forto de tiuj vivo kaj potenco kiu forigas okazon de ĉiaj militoj". Ĉu vi fidele subtenas nian ateston ke milito kaj militpreparo malakordas kun la spirito de Kristo? Elserĉu tion ajn en via vivmaniero kio eble enhavas semojn de milito. Restu firma pri nia atesto, eĉ kiam aliaj faras aŭ preparas sin fari perfortaĵojn, tamen ĉiam memoru ke ankaŭ tiuj estas infanoj de Dio.

32. Venigu en la dian lumon tiujn emociojn, sintenojn kaj antaŭjuĝojn ene de vi mem kiuj kuŝas ĉe la radiko de detrua konflikto, agnoskante vian bezonon de pardono kaj graco.. Kiumaniere vi partoprenas en la repaciga agado inter unuopuloj, grupoj kaj nacioj?
33. Ĉu vi viglas pri kutimoj tie ĉi kaj tra la tuta mondo kiuj diskriminacias kontraŭ homoj pro tio kio ili estas, kiuj ili estas aŭ pro iliaj kredoj? Atestu la homecon de ĉiuj, inkluzive tiujn kiuj malobeas la konvenciojn aŭ la leĝojn de la socio. Penu percepti novajn burĝonojn en la socia kaj ekonomia vivo. Serĉu komprenon pri la kaŭzoj de nejusto, socia malkvieto kaj timo. Ĉu vi klopodas realigi socion justan kaj kompatan kiu ebligus al ĉiuj evoluigi siajn kapablojn kaj kiu kultivas servemon ?
34. Memoru viajn civitanajn respondecojn pri la traktado de aferoj lokaj, landaj kaj internaciaj. Ne retiriĝu de la postuloj tempaj kaj penaj rezultantaj de via engaĝiĝo. Respektu la leĝojn de la ŝtato sed via unua lojalo estu al la diaj celoj. Se vi sentas vin pelita de forta konvinko malobei la leĝon, ekzameni ĝisfunde vian konsciencon. Petu de via kunvengrupo tiun perpreĝan subtenon kiu fortigos vin dum klariĝas ĝusta vojo.
35. Ĉu vi subtenas tiujn kiuj agas pro konvinkego, eĉ se ilia vojo ne estas la via? Ĉu vi kapablas flankenlasi viajn proprajn dezirojn kaj antaŭjuĝojn, strebante kun aliaj trovi la dian volon pri ili?
36. Ĉu vi estas sincera kaj verama en ĉiuj viaj diroj kaj faroj? Ĉu vi konstante estas tute honesta en viaj negocoj kaj en via traktado kun individuoj kaj organizoj? Ĉu diskrete kaj respondece vi uzas monon kaj informojn konfiditajn al vi? Ĵurado implicas duoblan normon pri la vero; elektante anstataŭe solene aserti, konsciu la pretendon pri honesteco kiun vi faras.
37. Se oni premas vin malaltigi la gradon de via honesteco, ĉu vi pretas rezisti? Eblas ke niaj respondecoj al Dio kaj al nia proksimumo devigos nin adopti nepopularajn starpunktojn. Ne lasu ke viajn decidojn determinu deziro esti sociema, aŭ timo ke vi ŝajnu stranga.
38. Konsideru kiuj el la vojoj al feliĉo proponataj de la socio estas vere plenkontentigaj kaj kiuj povos montriĝi koruptaj kaj detruaj. Elektante distribojn kaj informilojn, estu selektema. Rezistu la deziron akiri posedaĵojn aŭ enspezon per maletika investo, spekulacio aŭ vetludoj.
39. Konsidere la malutilon kaŭzitan de uzado de alkoholo, tabako kaj aliaj dependigaj drogoj, demandu vin ĉu vi limigu vian uzadon, aŭ tute detenu vin de tio. Memoru ke ajna uzado de alkoholo aŭ drogoj povas difekti la juĝkapablon kaj endanĝerigi kaj la uzanton kaj aliajn.
40. Penu vivi simple. Simpla vivstilo, libervole elektita, estas fonto de forto. Ne persvadiĝu aĉeti kion vi ne bezonas aŭ por kio vi ne havas pagipovon. Ĉu vi informiĝas pri kiel via vivstilo efikas al la tutmondaj ekonomio kaj naturmedio?
41. Ni ne proprietas la mondon, nek rajtas laŭvole disponigi ties riĉaĵojn. Elmontru amplenan atenton pri ĉiuj kreitaĵoj kaj penu konservi la belecon kaj la diversecon de la mondo. Agadu por certigi ke nia kreskinta potenco super la naturo estu respondece uzata, respektigante la vivon. Priĝoju la grandiozon de la daŭra dia kreado.

---

Estu modeloj, estu ekzemploj en ĉiuj landoj, lokoj, insuloj, nacioj, kien ajn vi venos, ke via konduto kaj vivo prediku inter ĉiaj homoj, kaj al ili; tiel vi fidoplene povos marŝi tra la mondon, respondante tion dian en ĉiu homo. (George Fox, 1656)